20 aprilo 1932

Sro. Ernst Eriksson, Parlamentano,
Sv. Järnvägsmannaförbundet,
Wästeraagatan 2,1,

S t o c k h o l m Wa.

Suède

Esperanto en fervojo
Via let.11.4.32.

Tre estimata sro. Eriksson,

ni tre dankas vin pro viaj sciigoj, precipe pri la interveno de sro. Steiner okaze de lia vizito. Ni ankoraŭ ne ricevis kompletan raporton de li kaj pro tio ni ne povas ion diri. Sro. Steiner venos al Ĝenevo post 2 tagoj. Tiam ni demandos lin pri detaloj.

Sro. Reg.Konsilisto Steiner ja ne iris kiel privat-persono al via lando, sed kiel nia speciala sendito. Inter la taskoj estis ankaŭ tiu, esplori la oblecojn de progresoj inter fervojistoj kaj precipe ĝe administracioj. Sro. Steiner estis fervoja inspektoro kaj pro tio konas tute speciale la kampon.

Kompreneble estis interkonsentite, ke li entreprenos tiajn paŝojn nur en interkonsento kun la koncerna loka gvidantaro kaj precipe kun la nacia societo, en Svedujo do la Sveda Federacio; ĝi tiu cetero fiksis la voj-iron kaj organizis la paroladojn pri Aŭstrio.

Ni apenaŭ povas imagi, ke sro. Steiner estus entreprenintaĵon sen antaŭa interkonsento kun la Federacio. Se jes, li agis kontraŭ nia instrukcio. Tiam li nepre rajtus ricevi riproĉon, ĝar kompreneble rifuzo foje donita, ne estas facile riparebla.

Ni rekomendas al vi, interrilati pri tio kun la Federacio. Sro. Malmgren certe bonvolas informi vin pli precize. Ni sendas hodiaŭ kopion de nia skribaĵo al li. Li certe skribos al ni, se io ne estas en ordo, en tiu ĝi afero.

Pri la iniciato estos ankaŭ rekomendinde interkonsenti kun la Federacio. La ĝefafero estas, ke ni havu sufiĉe da esperantistoj, povantaj prifiti de distingo. Ni ankaŭ rekomendas, ke vi ne instigu la portaĵon de simpla insigno (stelo) sed de rubandeto kun la surskribo "Esperanto parolata". Simpla insigno ĝisem konservos la karakteron de privata asocia insigno, dume rubando videble distingas. Ĝi samtempe estas bona propagandilo senpaga. Ĉi tion oni prefere ne diru al la portantoj. Multaj ne ŝatas esti "migranta reklamisto"; ili devas tion fari nekonsciante.

Atendante plajn novaĵojn de vi, ni restas

kun plej samideanaj salutoj

INTERNACIA CENTRA KOMITATO
de la Esperanto-Movado
Direktoro

K.: Sved.Fed.
Mt.